// SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban,* **PERPIGNAN** *(P.-O.) - Telefono 34-38-84*

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o- NUMERO 4 -o-o-o- OKTOBRO 1961 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

KOMPETENTA EKSTERLANDA ESPERANTISTO POVAS PRELEGI EN VIA URBO

Por pli efike labori por la disvastigo de Esperanto kaj kunlabori al la taskoj de nia regiona Federacio kaj de nia nacia movado, la Kultura Esperantista Centro de Perpignan dungis kiel administran sekretarion nian hispanan samideanon S-ron. Darío Rodríguez López de Silva.

La pago de lia salajro estas, kompreneble, tre peza ŝarĝo kiun la Centro nur pene povas elteni, dank'al la mondonacoj de ties Prezidanto.

S-ro. Rodríguez, kiu scipovas tre bone Esperanton kaj treege klare kaj kompreneble prononcas ĝin, povus prelegi esperantlingve pri diversaj temoj en iu ajn Esperanto-Grupo. Tio estus bonega okazo por aŭdigi al la novbakitaj samideanoj paroladojn en klara Esperanto. S-ro. Rodríguez partoprenis kiel preleganto la Kulturan Seminarion en Grésillon dum Julio 1961.

La grupoj kiuj dezirus akcepti S-ron. Rodríguez devus pagi al la Kultura Esperantista Centro de Perpignan lian vojaĝ- kaj restadkoston kaj honorarion por kompensi la altajn elspezojn kiujn la Centro havas.

Tiuj prelegoj povus okazi ekde Oktobro ĝis Decembro ĉijara aŭ ekde Aprilo venontjara.

Ĉiumaniere, la vizito de eksterlanda preleganto povas esti motivo por ke la Grupo petu ioman subvencion al la lokaj aŭ departementaj aŭtoritatoj, kio kompensus la elspezon faritan. Vi devas certe scii ke nuntempe estas fortaj eblecoj por ricevi subvenciojn (ekzemple: el la departementa fako "Jeunesse et Sports"), kondiĉe ke la sumoj estu dediĉitaj al la preparo de kulturaj aranĝoj. Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu kontakti la Kulturan Esperantistan Centron : 5, Quai Vauban, PERPIGNAN.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

GRAVA SUKCESO EN LA PORINSTRUISTAJ SEMINARIOJ DE PERPIGNAN

Dank'al konstanta agado, la Direktorino de la Seminarioj en Perpignan lasis al la Prezidanto de U.E.F., s-ro. Llech-Walter, la permeson organizi kunlabore kun la intendanto (nova esperantisto) la Esperanto-kursojn kiujn ili konsideros oportunaj. Kompreneble, multajn kursojn oni malfermos dum Oktobro en la du Seminarioj, por instruistoj kaj por instruistinoj.

Ankaŭ, kiel kutime, la publikaj kursoj okazos en ECOLE RACINE, Rue de la Lanterne, ĵaŭde kaj sabate je 17 h. kaj dimanĉe je 1[illegible] h. Ankaŭ ili okazos en aliaj lernejoj laŭ la eblecoj.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

AKADEMIA INSPEKTORO DE PYRENEES-ORIENTALES, S-RO. TORRAILLES, FAVORAS ESPERANTON

Per cirkulero sendita al ĉiuj lernejestroj de la departemento Orientaj Pireneoj, S-ro. Torrailles, Akademia Inspektoro, rekomendas la malfermon de kursoj de Esperanto por plenkreskuloj (vesperaj kursoj).

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

EN TORINO GRAVA SUKCESO ĈE INTERNACIA KONGRESO DE LA POPOLUNIVERSITATOJ

Dank'al la agado de S-ro. Petit, la Kongreso voĉdonis unuanime rezolucion favore al Esperanto, kaj eĉ realigon de eksperimento en Romo dum Julio 1962 kun novaj lernantoj de Esperanto el ĉiuj landoj.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

Abono al nia bulteno : 1 NF jare, per p.m. aŭ sendo al la Federacia CCP 956.28 Montpell.

## MONTPELLIER

Kiel dum pasintaj jaroj, la kunvenoj de la Grupo okazos la unuan lundon de ĉiu monato en 34, Rue de l'Université (kontraŭ la Scienca kaj Jura Fakultatoj), je la 21[a] horo. Dum Oktobro, la Grupo ricevos la viziton de japana samideano. Dum lia restado en Montpellier okazos kunveno de la Grupo kaj regiona renkontiĝo en "le Grau du Roi". Ĉar ni ne konas ekzakte la daton de lia alveno, ni ne povas fiksi la tagon, sed ni sendos kunvokilojn tuj kiam ni ricevos informon pri tiu vizito.

Ni plezure ricevis la viziton de pola samideanino kiu studas ĉijare en la Medicina Fakultato de Montpellier.

Por ĉiuj informoj pri la Grupo, turnu vin al :

Groupe Espérantiste - 5, Rue Docteur Roux, MONTPELLIER (Hérault).

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## QUILLAN

La Esperanta Societo "La Verda Stelo", Quillan (Aude), sciigas al la izoluloj de la ĉirkaŭaĵo de Quillan, ke elementaj kursoj de Esperanto okazas ĉiujaŭde je la 21[a] horo, komence de Oktobro, en "Salle Paulin Nicoleau".

La instruanto insiste petas al aliaj regionaj kluboj interŝanĝon de diapozitivoj kaj sonbendoj (rapido 9,5 cm.) pri ĉiuj temoj (krom politikaj kaj religiaj). Nepre ni respondos sammaniere. Dankon ! Adreso: S-ro. Régnier, 11, Rue la Mairie, QUILLAN (Aude)

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## EĤOJ EL LA REGIONO

Nia kara samideano s-ro. Jean Bénit, instruisto en BLOMAC (Aude), kvankam izole, disvastigas senlace kaj entuziasme nian lingvon. Li plenumas gravan informan agadon ĉe la tutlanda instruista medio. Jugoslava samideano s-ro. Željko Sabol, studento ĉe la Universitato de Zagreb kaj samideano s-ro. Fischer, el Nederlando, vizitis lin lastatempe.

En Argelès-sur-Mer, niaj entuziasmaj amikoj gesinjoroj Bénazet, instruistoj en tiu urbeto, aktive disvastigas nian lingvon. Saman laŭdindan aktivecon plenumas s-ro. Salasc en Béziers. Ni diskonigos la aktivecon de ĉiuj esperantistoj el nia regiono por favori la interŝanĝon kaj interkomunikadon de ĉiuj.

=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=0=

## "FRANCA ESPERANTISTO" APEROS REGULE ĈIUMONATE

"Franca Esperantisto", la grava revuo kiun ĉiu samideano nepre devas aboni, eliros komence de Oktobro el nova presejo. Dum Novembro aperos speciala numero ofsete presita, dediĉita al la vivo de la Federacioj kaj Grupoj. Sendu tuj viajn komunikojn, se eble maŝinskribitaj laŭ duobla interspaco, al s-ro. Paul Ciliga, U.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris-X. Abonprezo jare : 10 NF kun membreco kaj 7 NF sen membreco, sendeblaj al nia Federacia poŝtkonto CCP 956-28 Montpellier.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## LA MELODIO DE LA VINTRO : K U R S O J - K U R S O J - K U R S O J ...

En la bonega revuo de la Sveda Esperanto-Federacio ni legis artikolon kun tiu sama titolo, kun tre interesaj konsiloj por la aktivecoj dum la laborsezono. Ni eltiris la jenajn valorajn ideojn :

"Ĉiuj povas instrui komencantojn pri la elementaj partoj de nia lingvo. Se oni mem volas lerni Esperanton, la plej bona maniero estas mem instrui la lingvon. Samtempe oni faras servon al la movado.

Ne forgesu uzi la gazetaron. Informu pere de eventualaj artikoloj kaj notoj. Preskaŭ ĉiam oni senkoste informas pri kursoj, kiuj okazos.

Interkonsentu kun aliaj (neesperantaj) asocioj, ke vi antaŭ iliaj membroj rakontu pri Esperanto. Montru se eble kolorfotojn de kongresoj, k.t.p. (vi eble povas prunti tiajn).

Se vi tute ne (post esplorado) povas havigi instruiston, vi proponu la korespondan kurson.

Bone zorgu pri la komencantoj. Ili ne nur lernu la lingvon. Tre grava detalo estas informi pri la Esperanto-Movado. Rakontu ĉiusemajne 15 minutojn en la nacia lingvo pri la historio de Esperanto, organizado de la movado, montru Esperanto-librojn, k.t.p.

=.=.=.=.=.=